



8-6-1974

CGC N°
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73 Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 - Brasília (DF)

BOLETIM N° 33

MARÇO DE 1978

ÓRGÃO OFICIAL DO B.K.E

REDAÇÃO: - Maria Almada

UBERABA ESPERANTO - LIGO

Estis fondita esperantista Ligo en Uberaba (MG), celante disvastigi la Internacian Lingvon en tiu progresema urbo kaj ĝia regiono, dank'al laboro de la juna kaj diligenta s-ano Hamilton Santos kaj pluraj kunlaborantoj.

La inaŭguro de la ĵus fondita Ligo okazis en la 25-a de februaro pasinta, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 80 personoj.

Brazila Konsilantaro de Esperanto estis reprezentita de ĝia prezidanto F.S. Almada kaj edzino, krom aliaj vicprezidantoj, San-Paŭlo Esperanto-Asocio pere de du estraranoj - prezidantino Elvira Fontes kaj D-ro Walter Francini, vicprezidanto. Ĉi tiu lasta reprezentis ankaŭ Brazilan Esperanto-Ligon, kiel ĝia vicprezidanto. El San-Paŭlo estis ankaŭ aliaj personoj.

Ĉe la solena malfermo paroladis Prof. F. S. Almada, D-ro Prof. Walter Francini, S-ino Maria Almada (en Esperanto), kaj la ferman paroladon faris la prezidanto de la inaŭgurata organizaĵo, s-ano Hamilton Santos.

Pri la evento vaste informis la T.V. el Uberaba, la gazetoj kaj la bonega revuo "Destaque 1978", kiu aperigis kvarpaĝan intervjuon kun Hamilton Santos.

En tiu belega regiono de Minas Gerais jam delonge neniu aktivis sur esperanta kampo. Nun, neatendite fondiĝis la Uberaba Esperanto-Ligo, dank'al klopodoj de aktivaj junuloj kaj aliaj laboremaj geami-

koj. Ni kredas je la sukceso de tiu organizaĵo, kiu fariĝis konsistiganto de BKE.

Nekontestebla estas la afableco kaj gastameco de la uberabanoj. La grupo el San-Paŭlo estis frate kaj amike akceptita de ĉiuj simpatiantoj de Esperanto. Elkoraj kaj afablaj estas la familioj Pinheiro kaj Franchi, krom aliaj, kiuj akceptis kaj gastigis la vizitantojn.

La Direktoraro de la Ligo presigis sur la invitilo la jenajn frazojn:

"Dedicamos nosso trabalho: Às pessoas autênticas, às pessoas que têm a virtude de aceitação, às pessoas que amam e lutam, e compreendem, e perdoam."

La fondintoj kaj unua direktoraro de U.E.Ligo:

Prezidanto: Hamilton Santos

Vicprezidanto: Romes Sebastião da Rocha

Kasisto: F-ino Doralice Alves Franchi

Sekretario: F-ino Oni Alves Peixoto

Por kroni la feston nia grupo vizitis la tendon de la mondfama medio Francisco Cândido Xavier, samtempe vizitata de centoj da spiritistoj kaj scivolemuloj.

-----XXXXXXXXX-----

RIBEIRÃO PRETO (SP)

La prezidanto de BKE kaj lia edzino vizitis la faman "Ĉefurbon de la Kafo", ili kontaktis nian vicprezidantinon Antonieta Almada Miranda kaj S-anon José Pedro de Miranda, kiuj informis pri ioma stagnado de la movado en tiu urbo, sed nuntempe ĝi pliboniĝas.

Inter la esperantistoj de Ribeirão Preto, José Pedro de Miranda elstarigas kiel studema esperantisto. Li ellernis la lingvon kaj jam de kelka tempo ĝin instruas per korespondado. Kiel eks-jurnalisto li bone propagandas nian lingvon kaj ĝin disvastigas kontentige, plivigligante la grupon, farante ekspoziciojn, verkante artikolojn por la gazetoj, presigante belegajn bildkartojn, ktp.

Li bone plenumas sian taskon kiel bona esperantisto. Plezurigis nin lia interparolado en perfekta Esperanto. Ni gratulas nian S-anon kaj deziras al la Riberopretanoj sukceson.

-----xxxxxxxx-----

CAÇAPAVA (SP)

Kun bedaŭro ni konstatis la malestojn de nia s-ano kaj vicprezidanto Silva Velho en Uberaba, ĉar lia sanstato ne permesis, ke li ĉeestus la inaŭguron de la Uberaba Esperanto-Ligo. Tamen spite de lia sanstato li informis nin pri la ekzisto de esperantistoj en Três Corações (MG), kiujn li kontaktis. Ni deziras al nia kara vicprezidanto tujan resaniĝon.

-----xxxxxxxx-----

SOROCABA (SP)

San-Paŭlo Esperanta-Asocio okazigos regionan renkontiĝon ĉifoje en Sorocaba kunlabore kun Sorokaba Esperanto-Klubo, en la 30-a de aprilo venonta. En la kadro de tiu evento s-ano Silva Velho intencas fari esperantan ekspozicion.

Tiu renkontiĝo celas propagandi pri Esperanto kaj helpi al la prezidanto de Sorocaba Esperanto-Klubo en la esperanta kampo.

Estas invitataj ĉiuj gesamideanoj partopreni tiun renkontiĝon.

-----xxxxxxxx-----

DEZIRAS KORESPONDI:

PERUO — Gestudentoj 18-27 jaraj: -UEA — Delegito Janet Skotte — Malecón Paul Harris adreso: 336/200 Barranco Lima 4.

USONO — S-ro R. A. Stubblefield — Adr.: 5644 Blueridge, F.Worth, Tx. 76.112.
S-ino Linda Lair — Adr.: 3709 Frazier Ave., Fort Worth,

Tx. 76.110.

F-ino Sandra Suber — adr.: 1400 Coverdale Dr., Fort Worth, Tx. 76.134.

S-ro Larry Streiff — adr.: 1015 East Lovers Lane, Arlington Tx. 76.010.

S-ro Larry Young — adreso: — 2901 Malcolm, Fort Worth, Tx. 76.112.

S-ro Robert St. Clair Ph. D-Instruisto, Universitato de Louisville, Kentucky 40.208 (pri lingvistiko, teorio kaj apliko).

VENEZUELO — S-ro David G. Valecillos — Calle 79 nº3C-72, Maracaibo.

MEKSIKO — S-ro Guillermo L. Quevedo-28j. arkitekto — Adr.: Av. General Retana, 502 — Chihuahua — Meksiko.

POLÔNIA — S-ro Ryszard Cieniuch — ul. Kurantowa 4 m 228, 20.836-LUBLIN. Deziras korespondi kun brazila esperantisto pri spiritismo kaj teozofio.

-----xxxxxxxx-----

ILHEUS (BA)

Ni gratulas al nia vicprezidanto Elleus Leonardo de Sá, kiu ĵus finis la kurson pri beletristiko ĉe la Universitato Santa Cruz de Ilheus.

Post la ricevo de la diplomo li faris paroladon pri Esperanto kun granda sukceso. Gratulon!

-----xxxxxxxx-----

ĈEKOSLOVAKIO — Aperis tre interesa libro pri "Krucenigmoj kaj Humoro" kun tre utilaj desegnaĵoj distraj. La libron eldonis Stano Marković kaj Stano Marček. Ni varme rekomendas tiun libron al niaj junaj gesamideanoj. Oni povas mendi laŭ la jena adreso: — Junulara Esperanto-Klubo, Stano Marček, Moskovská 4—C.S.—03601—Martin — Ĉekoslovakio.

-----xxxxxxxx-----

FRANCIO — Ĉijare okazos la 51-SAT kongreso en Lektur (Francio), kaj tiuokze la O.K.K. organizos tutmondan ekspozicion pri infandeseĝnaĵoj kun la temo "vi-

vkondiĉoj de la laboristoj". Bildoj, leteroj, afiŝoj, pri metiaj produktoj ktp., kaj ĉio alia estas bonvenaj por propagandi Esperanton. La adreso: - S-ro Jean Claude BOURGEAT - Saint-Puy, F-32 - Valence sur BAISE - Francio.

-----XXXXXXXX-----

PORTO ALEGRE (RS) - Nia vicprezidanto, D-ro Modesto Belmonte de Abreu, oficiale faris specialan apelacion al "Empresa Brasileira de Correios e Telégrafos", sin direktante al ĝia prezidanto la Kolonelo Advaldo Botto, por ke oni enkonduku Esperanton en la "Escola Superior de Administração Postal da América Latina" en Brazilio.

Samideano Belmonte de Abreu klarigis en sia petletero, kio estas Esperanto kaj kian signifon havas ĝi nun kaj kian havos estonte. Ni deziras sukceson al tiu apelacio de S-ano Abreu, kiu ne pretervidas tiajn bonajn eblecojn enkonduki la internacian lingvon en Poŝta kampanjo. Gratulon, kuraĝe antaŭen!

-----XXXXXXXX-----

ALTO PARAIZO (GO) - S-ano D-ro Lima Melo informas nin pri la ebleco aŭskulti esperantajn programojn en radio: Dimanĉe - Horo 17,05 ĝis 17,20 Vatikano, je 15620 KHZ. Marde - Ĵaude kaj sabate - Horo 18,35 ĝis 18,45 - Berno (Svisujo), je 11720 kaj 11850 KHZ; Vendrede kaj sabate - Horo 17,00 ĝis 17,30 Azio ĉirkaŭ 10.000 KHZ; Sabate - Horo 9,30 ĝis 10,00 Azio je 15,520 KHZ.

Li informas, ke la plej facile aŭdebla estas la programo de Svisujo - kurtonda radio je 11.850 KHZ. Li konsilas ŝalti la aparaton ĉe 11865 KHZ je la 18,25 horo kaj tuj oni aŭdos 12 muzikajn notojn, kiuj ripetiĝas dum 5 minutoj ĝis kiam eniras la eteron la portugala programo de "La voĉo de Germanio" post oni turnu la butonon maldekstren kaj oni aŭdos Bernon apud la Sveda radio; oni atendu 5 minutojn kaj tiam oni aŭdos Esperanton.

Dankon al nia kara s-ano pro tiuj informoj.

-----XXXXXXXX-----

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas la jenajn gaze-

tojn: - Correio Fraterno do A.B.C., Informilo de Sorocaba Esperanto Klubo, Brazilia Esperantisto, Comarca de Promissão, O Globo - Revista Portuguesa de Esperanto, Budapeŝta Informilo, Informilo de S.E.K.O. NOSSO, SEI, Correio do Povo, Correio do Sul, A Candeia, Fenikso.

-----XXXXXXXX-----

SCIIGOJ

Correio do Povo el Porto Alegre aperigis tre interesan artikolon pri la vizito de la UEA - estraranino Ursula Grattapaglia, farita al Rio Grande do Sul. Sin akompanis grupo de esperantistoj kune kun nia vicprezidanto D-ro Modesto Belmonte de Abreu.

Meninão Santista, órgano de "Lions" klubo de Santos, aperigis artikolon pri Esperanto, verkita de nia prezidanto F.S. Almada, celante propagandi la Internacian Lingvon inter la leonanojn. Temas pri pionira laboro de nia vicprezidanto Silva Velho.

-----XXXXXXXX-----

MONO RICEVITA

Ni ricevis kaj el tuta koro dankas monhelpon por nia Bulteno:

José Pedro de Miranda	Cr\$ 200,00
Guiomar Amélia Deaquino .	Cr\$ 30,00
Adonis M.S. Silva	Cr\$ 150,00
	<u>380,00</u>

-----XXXXXXXX-----

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. (Argentino)

Bona estas la frazo: "Mi vendis mian domon "kun" profito, dum mia bofrato vendis la sian "kun" perdo". Kelkaj lernantoj lernas "per" fervoro, (estas malbona), ni diru: lernas "kun" fervoro. Ni atentu pliajn prepoziciojn. La pordon oni povas fermi "sen" bruo kaj oni povas fermi "kun" bruo. Bone estas: "Ŝi malfermis la fenestron "en" plena larĝo". Same oni diras: Ŝi tremis pro timo "en" la tuta korpo kaj ne "kun" la tuta korpo". Plie neĝas ankaŭ ne "kun" grandaj flokoj sed "en" grandaj flokoj. Oni ankaŭ parolas ne "per" kelkaj lingvoj, sed "en" kelkaj lingvoj. Oni diras: Ĉu vi parolas "en", esperanta lingvo, aŭ ĉu vi parolas esperante? - Malbone estas: Ŝi parolas "kun" sia amikino "kun" sekreto ans-

tataŭ "en" sekreto. "Kun" oni uzas kiam por la malo oni uzas "sen". Ekz.: "kun" bruo — "sen" bruo. "Kun" fervoro, "sen" fervoro, ktp. Oni vivas ne "kun" mizera vivo sed "per" mizera vivo. Ankaŭ: Li eltrinkis la glason da vino "per" unu tiro. Diru: Stari "kun" unu piedo en la tombo, la ĝusta prepozicio estas - stari "per" unu piedo en la tombo. Ni diru: la malfeliĉulo kriis "el" sia mizero. "Pro" sia mizero - havas alian sencon. Oni legas ne "de" libro sed "el" libro. Malbone: Li aranĝis la liston "per" alfabeto ordo, anstataŭ "laŭ" alfabeto ordo. Oni kutime falas ne "kun" sia longeco, sed "laŭ" sia tuta longeco. La sola vorto, "sur" kiu mi stumblas estas substrato. La ĝusta frazo estas: La sola vorto "super" kiu mi stukblas estas substrato. Tie ĉi la prepozicio "super" montras staton de iu, kies atento direktiĝas al ia laboro, ekz.: "La trompantoj laboradis "super" la malplenaj teksiloj. Aŭ: "Li ŝvitas ankorau "super" la alfabeto. Aŭ: "Kiam ajn oni venas, li kudris diligente". "Super" montras ankaŭ pozicion de objekto rilate al la alia, kiu estas lokita pli malalte kaj ne tuŝas ĝin (sen translokiĝo). Ekz.: "Super" la tero sin trovas aero. Kun translokiĝo: "La vespera ombro etendiĝas "super" la kamparo", ktp. Kun "super" en tiu senco oni ordinare ne uzas akuzativon, tamen foje kiel en: "la fiŝoj elsaltis "super" la akvon. La suno leviĝis "super" la teron, ktp. (Daŭrigota).

-----XXXXXXXXXX-----

CURITIBA (PR) — Nia vicprezidanto Majoro G.A. Silva Velho sciigis nin pere de kserografia kopio de artikolo de li verkita, pri la movado en la ĉefurbo de Paraná, kie la akademiano, D-ro Geraldo Matos, profesoro kaj poeto pri Esperanto, kreis la Paraná Esperanto-Organizaĵon, helpata de ges-roj Jair Reis kaj Ramona Kaniak, kiu kunlaboras kun la Paraná Esperanto-Asocio. Prof-ro Matos estas aŭtoro de la libro "Ritmoj de Vivo" kaj gvidas kurson de Esperanto en la Katolika Universitato de Paraná. Gratulon al eminenta aktivulo!

-----XXXXXXXXXX-----

HEROLDO DE ESPERANTO

Ni rekomendas al niaj legantoj abonitajn periodaĵojn, ne nur pro tio, ke ĝi estas

leginda informilo el Eŭropo, sed ankaŭ pro tio, ke tiamaniere oni povas aktualiĝi pri ĉio okazanta en la mondo esperantista. Oni turnu sin al s-ro **Amarilio Carvalho**, respondeculo pri la abonoj en Rio de Janeiro (RJ) - Ĉe Kultura Kooperativo de Esperantistoj - Av. 13 de Maio, 47 - sobreloja 208 - Mara vojo: Cr\$ 100,00. Aervoje: Cr\$ 200,00.

-----XXXXXXXXXX-----

JUNULARA ANGULO — Estis realigita la I-a Regiona Renkontiĝo de BEJO en Niteroi (RJ), de la 26-a ĝis la 29-a de januaro 1978-a.

Partoprenis la eventon krom la ĉefdelegito de UEA en Brazilo, s-ano G. Grattapaglia, 70 gejunuloj el 11 urboj. Okazis disdonado de diplomoj al kursintoj de K.K.E., estante distra parto dum la renkonto. Oni decidis okazigi la II-an Renkontiĝon en Gojanio (GO), en la venonta jaro.

La tasko de la junularo jam programita por la nuna jaro estas vasta. Oni pripenas prezenti teatraĵon, muzikfestivalon, kaj elekti Fraŭlinon Esperanto por la jaro 1978-a en Marilja (SP), en la kadro de la Latinamerika Kongreso.

Inter la plej diligentaj junuloj estas nia s-ano André Luiz Fausto de Souza, bone konata pianisto, Ciro Freitas, prezidanto de BEJO, kiu pritraktos la teatraĵon en Marilja.

-----XXXXXXXXXX-----

LATINAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO — Kiel ni jam sciigis antaŭe, okazos ĉijare en Marilja (SP), de la 17-a ĝis la 22-a de julio la I-a Latinamerika Kongreso de Esperanto, kies bruoj jam transiris marojn kaj eĥas en Eŭropo, Nordameriko, Azio kaj Afriko, estiganta grandan intereson ĉie. Oni jam anoncis karavanojn el Eŭropo kaj Usono, auspiciatajn de UEA.

Komence de februaro la ĉefdelegito de UEA por Brazilo vizitis la urbon, kaj tiam la urbestro D-ro Theobaldo de Oliveira Lyrio, la ŝtata deputito Armando Souza Pinheiro kaj la prezidanto de la urba konsilantaro, D-ro Sebastião Monaco, deklaris, ke, ĉar sur la blazono de Marilja estas skribite "Amor e Liberdade" (Amo kaj Libereco) estos tia la etoso en kiu la urbo

akceptos la esperantistojn! Invitátaj jam estas ĉiuj gesamideanoj en amerikaj landoj kaj koncernaj ambasadoroj en Brazilio. En Usono, Flying Dutchmen Travel - Esperanto Fako 951 Front St. NOVATO CA 94947m lanĉis du karavanojn al Brazilio.

Inter alie, la I-a Latinamerika Kongreso de Esperanto estos taŭga provo de la organizaj kapabloj de brazilaj esperantistoj, antaŭvide al la 66-a Universala Kongreso de Esperanto en la Ĉefurbo Brazilio en la jaro 1981-a.

En la enlando la entuziasmo estas ne malpli granda. En Uberaba, ekz., kie estis fondita Uberaba Esperanto-Ligo antaŭ kelkaj tagoj, oni jam pripensas organizi karavanon, kiu partoprenos la kongreson.

Nia prezidanto ricevis komunikon de la Ministerio por Edukado kaj Kulturo sub n^o 94/FNDE, de la 24-a de februaro lasta, pri la kredito sub la dispono de Brazila Konsilantaro de Esperanto en Banko de Brazilo-Marilja, je Cr\$ 120.000,00 - Kontribuo de "Plano de Aplicação de Recursos" de tiu Ministerio al realigota kongreso en tiu urbo.

Ni el tuta koro dankas la kontribuon al Ministerio.

Informojn oni petu al Prof-ro Wilson Ferreira Martins, Poŝtkesto (Caixa Postal) N^o 556 - CEP 17.500 - MARILIA (SP) - Brazilo.

-----XXXXXXXXXX-----

SAN-PAULO (SP) — En sia Bulteno San-Paulo Esperanto-Asocio informas, ke de la pasinta januaro SPEA realigas intensajn kursojn monate sub la gvidado de Valdemir Moreira, celante prepari la plej grandan nombron da partoprenontoj por la Latinamerika Kongreso. Krom tiu speciala instruado estas aliaj kursoj dum ĉiuj sabatoj en pluraj horaroj. En Vila Duzzi (São Bernardo do Campo) la "Grupo Fraternidade" organizas kurson sub la auspicio de SPEA, gvidota de Lourenço Rioji Sogabe, vicprezidanto de BEJO.

Krom tiuj kursoj estas ankaŭ supera kurso kaj padagogia.

La kadro de la instruistoj estas granda: André Luís Chiossi, Deodato França, Elvira Fontes, Gilberto Francisco Bartholomeu, Heliana Lucia da Cruz Corrêa, Lourenço Rioji Sogabe, Nelson Silveira kaj Valdemir Moreira.

-----XXXXXXXXXX-----

QUITO (EKVADORO) — En tiu urbo Esperanto progresas. Universitataj studentoj, entuziasmigataj post la parolado de S-ro Patricio Zurita, katedra Prof-ro pri Fiziologio, decidis fondi Esperanto-Klubon de Ekvadoro, kaj nun ili apelacias al brazilaj esperantistoj por ke oni sendu al ili librojn, revuojn, ktp. Adreso: - Esperanto-Klubo, Fakultato pri Medicinaj Sciencoj, Universitato de Ekvadoro, - Quito.

-----XXXXXXXXXX-----

INFORMOJ PRI HOTELOJ EN MARILJA

- 1 - **Hotel Holliday Inn** — Rua Aimoré, 501 — Tel. 2092 — Ĉe kongresejo: Dulita apartamento - 1 persono Cr\$ 380,00; 2 pers. Cr\$ 495,00
Geedzaj apartamentoj - 1 persono Cr\$ 430,00; geedzoj Cr\$ 530,00
"Suite" (plikomfortaj) 1 persono Cr\$ 1.035,00; 2 pers. Cr\$ 1.200,00
Ĉe "Suite" plus Cr\$ 100,00 por pli da personoj.
Apartamento kun pordo al naĝejo - 1 pers. Cr\$ 460,00; 2 p. Cr\$ 575,00
Nur kun matenmanĝo. — Ĝi estas la plej proksima al kongresejo
- 2 - **Tenda Hotel** — Rua 7 de Setembro, 35 — Tel. 2588
Piede 15 minutoj de la kongresejo.
Apart^o unulita ĉambro Cr\$ 250,00; dulita Cr\$ 390,00; trilita Cr\$ 520,00
Luksaj apartamentoj: unulita Cr\$ 310,00; 2-lita Cr\$ 510,00; 3-lita Cr\$ 610,00
Nur kun matenmanĝo.

- 3 - **Marilia Palace Hotel** — Av. Brasil, 116 — Tel. 3163.
Unulita ĉambro Cr\$ 120,00; dulita Cr\$ 210,00;
Apartamento unulita Cr\$ 190,00; dulita Cr\$ 350,00; 4-lita Cr\$ 500,00
"Suite" — unulita Cr\$ 400,00; 2-lita Cr\$ 550,00; 3-lita Cr\$ 800,00; 4-lita Cr\$ 1.000,00
Kun bona matenmanĝo.
- 4 - **Umarama Hotel** — Rua Prudente de Moraes, 128 - Tel. 7130
Unulita apartamento Cr\$ 170,00; dulita apartamento Cr\$ 300,00; 3-lita Cr\$ 390,00
Unulita ĉambro Cr\$ 105,00; dulita Cr\$ 190,00
- 5 - **Lider Hotel de Marilia Ltda** — Rua 9 de Julho, 1331 — Tel. 3346
Dulita ĉambro Cr\$ 80,00; apartamento Cr\$ 120,00 — Tagmanĝo Cr\$ 35,00
Laŭ kombino tiuj hoteloj donos rabaton.
- 6 - **Hotel Santa Helena** — Rua Armando Salles de Oliveira, 43 — Tel. 4293
Dulita ĉambro Cr\$ 160,00; unulita Cr\$ 80,00
Kun matenmanĝo.
- 7 - **Hotel São Bento** — Av. Sampaio Vidal, 826 — Tel. 2162
Dulita ĉambro Cr\$ 180,00; Dulita apartamento Cr\$ 250,00
Kun matenmanĝo.
- 8 - **Rex Hotel** — Rua Armando Salles de Oliveira, 77 — Tel. 9213
Trilita ĉambro Cr\$ 240,00; dulita ĉambro Cr\$ 160,00
Apartamento (geedzoj) - Cr\$ 300,00; apto. 1 persono Cr\$ 150,00
Kun matenmanĝo.
- 9 - **Hotel Miranda** — Rua 9 de Julho, 1412 — Tel. 4195
Apart. (geedzoj) Cr\$ 300,00; unulita apartamento Cr\$ 150,00
Unulita ĉambro Cr\$ 90,00; trilita ĉambro Cr\$ 270,00

Kun matenmanĝo

- 10 - **Grande Hotel** — Rua 9 de Julho, 1104 — Tel. 2187
Laŭeble oni kunportu litkovrilon aŭ lankovrilon!

ATENTU!

Krom la hoteloj ekzistantaj en Marilia, estas ankaŭ gastigado senpaga por 300 personoj en lernejoj internulejoj

-----xxxxxxxx-----

BRAZILIO (FD) — Nia ĝenerala Sekretario informis gravan paŝon de Nia BKE, sub la titolo: - **LOKA MOVADO** - En la sidejo nun kunvenas dufoje ĉiusemajne - merkrede kaj sabate je la 20-a horo kun Perfektiĝa Kurso de mi gvidata. En la komenco de marto ekfunkcios diversaj Elementaj kursoj: I) U.D.F. (privata universitato), instruanto D-ro Waldir Silvestre; II) en la sidejo, instruisto D-ro Carlos Gomes Sanromã; III) F.E.B., instruisto Francisco Matos; IV) Comunhão Espírita de Brasília, instruisto José Carlos Esteves; ankaŭ okazos kursoj Ĉe FREL kaj aliaj organizaĵoj, kiujn ni ekkontaktos. Preparu ni por la Latinamerika Kongreso!

-----xxxxxxxx-----

ESPERANTO ELEMENTAR — Oni ne forgesu ke tiu instrulibro estas vendata en la jenaj lokoj: - Brazilio ĉe la Sekretariejo (Cx. Postal 07-1182); Uberaba, adreso de la prezidanto de Uberaba Esperanto-Ligo (Hamilton Santos - Rua 7 de Setembro, 28 — CPF 38.100; San-Paulo (SP) — Ĉe San-Paulo Esperanto-Asocio - Av. São João, 1333 - 2º - 21 - CEP 01035 aŭ Cx. Postal 5.888 — CEP 01000; Santos, Livraria "Pingo de Luz" — Rua Marechal Deodoro, 11 — CEP 11.100. Tiu libro estas taŭga ne nur por la lernantoj sed ankaŭ por la instruistoj, ĉar direktas la instruadon kiel "vademecum".